# Esperanta turisto

Nro 3/1939.

„Esperantan turiston" eldonas Esperanta turista societo en Ljubljana, Ulica moŝa Pijade 22. Jugoslavio. Ĝi aperas laŭ turisma bezono 2-foje en la jaro. Respondeca redaktoro Kaplan Martin, Galjevica 14, Ljubljana, Jugoslavio.

Perantoj, kiuj kolektos anoncojn, abonantojn kaj grupetojn ricevos gazeton senpage. Turnu vin direkte al prezidento de E.T.S. Martin Kaplan!

Kial estas la plej konvena loko por Internacia Esperanta kampadejo nur Koper? Urbo Koper estas la plej konvena ne nur pro tio, ĉar ĝi estas la plej proksima kaj limas kun Italio, Aŭstrio kaj eĉ la plej proksima estas ankaŭ por Hungario kaj Ĉekoslovakio. Ĉi-tie ne estas tro varmege kaj tro forta vento kaj per la plej proksima veturado oni multe profitas kaj eĉ manĝaĵo kaj tranoktado estas pli malmultekostaj en Koper ol en iu alia turista loko.

Urbo Koper estas tre interesa. Ĝi estis antaŭ multaj jaroj insulo. Oni poste ,arte faris duoninsulon. Ĉar Koper kun Ankaran havas marfundon el riversablo kaj en kelkaj lokoj eĉ el argilo. Ambaŭ bonege sanigas reŭmatismon, ostotuberkulozon, virinajn malsanojn kaj astmon. Tial oni ĉi-tie konstruis hospitalojn por ĉi-tiuj malsanoj.

Ankaŭ urbeto Izola estas apud Koper. Ĝi estas tre aloga, sed bedaŭrinde ni ne povas rekomendi ĝin al maljunaj kaj malsanetaj homoj, ĉar ĝi ne estas konvena aero nek la maro. Aero estas tre peza kaj la maro ne havas riversablon kaj argilon. Tie troviĝas multaj rokoj kaj ne estas tiel pura la maro kiel en Koper. En Koper estas sufiĉaj amuzlokoj, dancejoj,kinejoj, teatroj, muzeoj. Ĉiujn ebleecojn ni eĉ ne povas mencii, sed kiu frue registras sin kaj antaŭ pagas, havas rabaton.

Pro tio prizorgas Esperanta Turisto Ljubljana, Moŝa Pijade 22 plimalmulta prezo.

PREZA LISTO

Por tranoktejo, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo:

| | |
|---|---|
| Jugoslavio | 12,00 N. Din |
| Aŭstrujo | 25,00 A.ŝilingoj |
| Hungarujo | 113,00 H.forentoj |
| Ĉekoslovakio | pageble en Jugoslavia N.Din 7,20 ĈSSR krunoj |
| Polakujo | pageble en Jugoslavia N.Din 3,87 Zlotoj |
| Germanujo | pageble en Jugoslavia N.Din 3,84 D.M. |
| Italujo | 600,00 Liroj |
| U.S.A. | 0,96 Dolaroj |

Listo valoras nur se antaŭ pagas por kelkaj tagoj sufiĉe frue - sendata ĝis 1. junio.

Kelkaj vortoj ankaŭ por Esperanta centro en Volparija. Ĉi-tiun lokon proponis al esperantistoj aŭtobusa entrepreno SAP. SAP konstruis provizorajn dometojn /vekendo/ por sia sindakato, sed, ĉar estas por aŭtobusentrepreno nekonvena, ĉar ne estas proksime la mare, nek amuzejoj eĉ leĝantoj ne estas tie, pro tio mankas interesuloj.

Prezoj estas tre altaj. Daŭriga veturado de Koper, kaj ŝtata limo Trieste ĝis Volparija estas 38 km, kaj devas pagi ankoraŭ 10,40 N.Din. Loĝejo de maro estas fora 850 m. Mankas ebleoon por amuzi. Kulturaj aranĝoj tie ne estas. Aŭtobusa entrepreno ne estas de esperantistoj. Ĝi volis nur eluzi esperantistojn por sia profito. Oni eĉ promesis 2 o/o al la esperantistoj societoj kaj agitantoj por agiti. Ankaŭ esperantistoj tie ne troviĝas. Pro tio ni ne povas rekomendi Volparija.

A T E N T O

Legantoj pardonu al ni malfruiĝo de E.T. ĉar petolis nin kelkaj personoj: Legu artiklon en 2 numero de E.T. Voko de E.T. Ljubljana pri konferenco en Bohinj dum 29.X.1967 - Kiu kulpas?

Recenze kaj konfeso: Gazeto ne estas tiel kvalita, kiel devas esti. En ĝi bedaŭrinde troviĝas eraroj. Tiam, iom post iom ni povas ankaŭ forigi. Bedaŭrinde nun ni ankoraŭ ne povis, ĉar korektantoj, maljunaj esperantistoj senpage ne volas kunla-

bori, sed nur malutilas. Ni estas juna societo - sed estas neceso senpage labori por esperanta evoluo en turisma branĉo ĉar estas nun devigita labori senpage. ĝis kiam la rilato kun la funkciuloj de la S.E.L. ne plibonigos kaj trovos esperantistan matriotajpistinon en la presejo.

## D E Z I R A T A K U N L A B O R O

Societoj, delegitoj, funkciuloj kaj opuloj estas petataj kunlabori. Helpu organizi grupojn el ĉiuj landoj dum ripozoferio. Esperantistoj renkontiĝu kun Aŭstrujo, Hungarujo, Ĉekoslovakujo, Polujo, Italujo, Germanujo kaj aliaj landoj en Koper.

Interesuloj por feria tempo en la maro apud Koper anonciĝu plifrue al E.T.S. Ljubljana, Moŝa Pijade 22, ke vi povos prizorgi pli malmultekostan penzionon kaj antaŭpagu por kelkaj tagoj, ke oni povos fari liston por tuta ferio, junio, julio kaj aŭgusto.

## G E J U N U L O J

Ne forgesu dum la ferio organizi grupojn por partopreni esperantistan ripozejon al Koper, por bani en la maro kaj amuzi en bela Slovenia urbo Koper kun belega pejzaĝo.

## S C I I G I L O

Legantojn, kiuj ekpetis por unua numero de E.T. ni sciigas, ke ni ne povos plenumi ilian deziron, ĉar la unuan numeron populara Logar Tone, prezidento de la E.L. konfiskis, ĉar li ne volas kunlabori sengajno por Esperanto evoluo. Legu klarigon en dua numero de E.T., artikolon Voko de E.T.S. pri konferenco en la Bohinj dum 29.X.1967. Slovenio. "Kiu kulpas?"

## E S P E R A N T A T U R I S T O R E K O M E N D A S

Dum via restado en nia urbo vizitu Kavarna Evropa, Gosposvetska 2, la plej bona servo!

Hotel Slon, Titova 10, la plej bona hotelo en la urbo!



AVSTRIJA
MADŽARSKA
ITALIJA
BUDIMPEŠTA V KESZTHELY
BLATNO JEZERO
VÖLKERMARKT /VELIKOVEC/
TARVISIO /TRBIŽ/
RATEČE
KRANJSKA GORA
VRŠIČ
MOJSTRANA
JESENICE
TRENTA
VRATA
TRIGLAV
BOVEC
SOČA
KOBARID
TOLMIN
MOST NA SOČI
CERKNO
BOHINJ-ZLATOROG
BOH. BISTRICA
BLED
MOSTE
BEGUNJE
LESCE
ZG. GORJE
RADOVLJICA
KROPA
KRANJ
LIBELIČE
DRAVOGRAD
RADLJE OB DRAVI
PREVALJE
MEŽICA
RAVNE NA KOROŠKEM
SLOVENJGRADEC
KOTLJE
ČRNA
LIPOLD
ŠMIKLAVŽ
MISLINJA
ŠENTFLORIJAN
SOLČAVA
LOGARSKA DOLINA
LJUBNO
MOZIRJE
ŠOŠTANJ
VELENJE
LETUŠ
ŠENTRUPERT
GORNJI GRAD
KAMNIŠKA BISTRICA
VEL. PLANINA
CERKLJE
KAMNIK
BRNIK
VODICE
SMLEDNIK
UTIK
MENGEŠ
MEDVODE
ČRNUČE
DOMŽALE
TROJANE
VRANSKO
ŠEMPETER
CELJE
ČRNI VRH
LOČNICA
ŠENTVID
JEŽICA
LJUBLJANA
LUČINE
POLH. GRADEC
DOBROVA
VRZDENEC
HORJUL
PODLIPA
VRHNIKA
TOMIŠELJ
IG
LOGATEC
BOROVNICA
IŠKI VINTGAR
KUREŠČEK
RAKITNA
PLANINA
IDRIJA
NOVA GORICA
AJDOVŠČINA
VIPAVA
POSTOJNA
SENOŽEČE
DIVAČA
TRST
KOZINA
PIVKA
ILIRSKA BISTRICA
PIRAN
KOPER
PORTOROŽ
SAVUDRIJA
UMAG
NOVIGRAD
POREČ
PULA
RIJEKA
OPATIJA
RABAC-CRES VELI LOŠINJ
CRIKVENICA
NOVI
ZADAR ŠIBENIK SPLIT PLAKURSKA
MARIBOR
GORNJA RADGONA
LENART
RADENCI
MURSKA SOBOTA
REDICS
DOLGA VAS
LENDAVA
LJUTOMER
PTUJ
ORMOŽ
SREDIŠČE OB DRAVI
ČAKOVEC
KIDRIČEVO
SLOV. BISTRICA
SLOV. KONJICE
ROGAŠKA SLATINA
ROGATEC
KRAPINA
VARAŽDIN
BISTRICA OB SOTLI
KUMROVEC
KLANJEC
ŠENTRUPERT
MOKRONOG
ŠMARJEŠKE TOPLICE
TREBNJE
ŽUŽEMBERK
OTOČEC
NOVO MESTO
DOL. TOPLICE
METLIKA
ČRNOMELJ
VINICA
KARLOVAC
KARLOVAC BIHAĆ
ZAGREB
TUZLA
BANJA LUKA - SARAJEVO MOSTAR

# Mercator

Vizitu vendejon kaj bufedojn de la grand-vendejo MERCATOR: En tiu vendejo estas konkurenca prezo,ankaŭ kun servo vi estos kontenta!

En 300 vendejoj Mercator, kiuj estas vastaj en tuta Slovenio, al vi servos kun ĉio de nutraĵo,trinkaĵo, viandaĵo ĝis industria, teknika varoj por larĝa konsumo.

DONAC FONDUSO

| | | |
|---|---|---|
| Ljubljana Transport donacis | 300.- | N.Din |
| Kafejo Evropa | 250.- | " |
| Cosmos-Renault | 100.- | " |
| Hotel Slon | 50.- | " |
| Restoracio "Delavski dom" | 100.- | " |
| En Kastela Restoracio | 100.- | " |
| Gastejo "Istra",Moŝa Pijade 28 | 100.- | " |
| Biera-Farejo Union | 50.- | " |
| Hala Tivoli | 50.- | " |
| Hotel Union | 30.- | " |
| Tabaka Fabriko | 90.- | " |
| Gastejo Figovec | 40.- | " |
| Delikatesa | 50.- | " |
| Bonboniera | 50.- | " |
| Slovenija les | 100.- | " |

E.T.S. sincere dankas kaj rekomendas ilin al niaj gastoj, ke vizitu kaj elusu ilian servon.

ANONCOJ

Gajaj Jugoslaviaj gejunuloj invitas vin partopreni dum ferio la Slovenan maron en Koper, por ke vi interkonatiĝu kaj kune amuziĝu.

Korespondi deziras kun Ĉekoslovakio:

Pleterski Anton, Mojŝkerčeva 46,Ljubljana pri historio.

Korespondi deziras kun Ĉekoslovakio,Hungario, Italio,tuta mondo. Kolektas bildkartojn, turistajn prospektojn kaj poŝtmarkojn. Adreso: Metka Ĵibret, Rožičeva 3, Ljubljana,Jugoslavio.

Korespondi deziras kun Ĉekoslovakio, Italio, Anglujo, tuta mondo. Kolektas bildkartojn, turistajn prospektojn, poŝtmarkojn kaj kansonajn tekstojn. Mi estas lernanto de arangista lernejo kaj mi bezonas diversajn propagand-materialojn. Mi rekompencos kaj antaŭdankas! Adreso: Milan Košenina, Na jami 7, Ljubljana, Jugoslavio.

Komencantino 19-jara studentino deziras korespondi kun gestudentoj el tuta mondo prefere el Aŭstrujo, Ĉekoslovakujo, Hungarujo. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, kaj prospektojn. Adreso: Jožica Cencelj, Slomškova 4, Ljubljana, Jugoslavio.

---

Tiskal: Fabiani Viktor, Ljubljana, Goce Delčeva 2.



TURIST BIRO
LJUBLJANA-
TRANSPORT
EN NIAJ TURISTOFICEJOJ:
Ljubljana, Trdinova 3
Šentvid
Kamnik
Vrhnika
Jesenice
Slovenj Gradec
Ravne na Koroškem
Črna na Koroškem




INFORMOJ ORGANIZAĴO DE VOJAĜOJ KAJ EKSKURSOJ PER AŬTOBUSOJ, FERVOJO, ŜIPOJ KAJ AVIADILOJ ŜANĜEJO PASPORTOJ KAJ VIZOJ AGENTEJO DE AŬTOBUSAJ, FERVOJAJ, ŜIPAJ-KAJ AVIADILBILETOJ REGULAJ TURISTAŬTOBUSAJ LINIOJ EN BUDAPEST, SPLIT, MAKARSKA, POREČ, KAJ SARAJEVO LA JARRIPOZO ESTAS EN ORGANIZO DE NIAJ OFICEJOJ, LA PLEJ MALMULTEKOSTA VENDADO DE ENIRBILETOJ POR KULTURAJ, SPORTAJ KAJ AMUZAJ ARANGOĴ, REZERVADO DE HOTELĈAMBROJ PER NIA TURISTA AUTOBŬSARO VI KOMFORTE VOJAĜOS KAJ PLEJ MULTE TRARIGARDOS VIA VOJAĜOFICEJO: TURISTOFICEJOJ DE LJUBLJANA TRANSPORT